Skönvik, dum la vintro gviditaj de s-ro C. W. Sjögren el Sundsvall. Post tre bona kaj varieca programo okazis ekzameno. Daŭrigaj kursoj jam komencis en ambaŭ lokoj kun sama gvidanto. — Jen la ĝisnuna laboro en 1934 en Sundsvall kaj najbaraj lokoj: du kursoj por komencantoj, kvar daŭrigaj kursoj, unu nova societo (Skönsberg) kaj tri studrondoj. — Esperanta tago okazos 13.5. 17 kluboj kaj studrondoj en Västernorrland estas invititaj. *BeRo.*

ULRICEHAMN. 11.4. la gekursanoj de la daŭriga kurso, kiun T. Morariu dum tri monatoj sukcese gvidis, kunvenis por festi la adiaŭon de la instruisto. Simpla amika kunesto kun elkoraj paroladoj ktp. *Georgo.*

VÄXJÖ. 17.3. okazigis la kursanoj de la seppikaj kursoj finfeston en Frimurarpensionatet. Muziko, kanto, dancado

kaj skeĉo beligis la feston. Dro Bjarne Beckman, Karlskrona, faris paroladon pri la esperanta movado kaj pri la uzobleco de Esperanto. 20.3 oficiale finiĝis la kursoj. Ĉeestis la kursfinon red. Paul Nylén, Stockholm, kiu faris interesan prelegon pri Esperanto kaj pri la evoluo de la mondkulturo. La plensukcesaj kursoj estos sekvataj de novaj kursoj. Afable helpas nin la gazeto Smålandsposten, kiu de tempo al tempo enpresas artikolojn pri Esperanto. *Pajaco.*

ÖRNSKÖLDSVIK. »La Agloŝildo» Esperantoklubo invitis la hungaran instruiston s-ron Tibor Czitrom por gvidi daŭrigajn kursojn. Li faris plurajn prelegojn en diversaj lokoj en nia regiono pri la temoj »Hungarujo kaj ĝia popolo» kaj »Esperanto en la praktiko». Poste komenciĝis tri kursoj en du lokoj (Domsjö kaj Örnköldsvik) kun ĉ. 60 partoprenantoj. *La Persono.*

EN LA CENTRO DE DALEKARLIO nun okazas tri kursoj gvidataj de red. T. Morariu. En Insjön kun 42 partoprenantoj, en Leksand kaj Rättvik iom malpli. Bona humoro kaj vigla intereso malgraŭ la bela printempo. Antaŭ la kursoj Morariu prelegis kun lumbildoj pri Rumanio en Gagnef kaj la kurslokoj. S-ino M. bonege interpretis. *I.E.K.*

La Esperanto-distrikto de Östergötland jarkunvenis en la salonoj de Gästis en Mjölby 22.4. Estis elektata jena nova estraro: Prez. A. Allard; sekr. Sven Uno; kas. Britta Karlsson, ĉiuj el Motala; ceteraj estraranoj: Hillevi Zakrison, Linköping; D. Klasson, Mantorp, kaj Arne Dalström, Mjölby. Propono ke la distrikto aliĝu al SLEA estis malakceptata per grandega voĉplimulto. *La Korbisto.*

Alla Skåne-esperantister till kongressen!

För att ge möjlighet för alla att billigt resa till kongressen från Malmö, Lund och andra orter i Skåne anordnas ett extratåg, i vilket även utländska karavaner komma att delta.

Äk med detta *esperanto-tåg*:

Tillskriv:

ESPERANTA TURISTA KOMISIONO
Kungsgatan 31, MALMÖ.

F. Szilágyi.

Letero al mia onklino.

Kara Onklino, kun granda ĝojo mi aŭdis, ke vi jam finlernis la belan, printempkoloran lingvon kaj deziras partopreni la stokholman kongreson. Bonvenon! Nun vi petis de mi sciigojn pri la naturo, homoj kaj kutimoj, kaj parte en mia nuna letero mi informos Vin pri kelke da interesajoj.

Vi demandas, kia estas nun la vetero »tie ĉe la norda poluso». Dankon, de kelkaj tagoj tre bela. Eble la arboj ne tro rapidas surmeti siajn florajn kostumojn, ili ankoraŭ nur verde turnas sin al la ĉielspegulo, sed la suno brilas kaj iom post iom ĉio komencos flori. — La afero okazis tiel, ke unue venis la Glaciajvendisto. Tio okazis antaŭ kvar semajnoj, kiam la termometro decidis, ke ĝi forlasos sian antaŭan amaton, la nulton kaj komencis sian grimpadon al la pli altaj rondoj. Tiutempe ĝi atingis la du, aŭ tri gradojn kaj tiam aperis la Glaciajisto. En tia vetero la bonaj hungaroj kuntiras sian mantelon kaj trinkas teon kun rumo (kiu cetere estas nekonata en Svedlando), sed la Glaciajisto venkis kaj vendis. Tio estis la unua signo. Poste venis la knabinoj kun revema, printempa mieno. Printempo brilis de la freŝhaŭtaj, junaj vizaĝoj kaj baldaŭ helaj kostumoj kompletigis la revemajn, helajn mienojn. — Kiam ĉio estis tiamaniere preparita, la dormemaj anĝeloj konstatis, ke oni jam ne povas plu atendi, ili surpendigis la sun-ŝildon kaj komencis vendi la florojn kaj la spinaccon al la homoj, ĉio ekbrilis en la suno kaj la sola estaĵo, kiu estas iomete rezervema staras antaŭ mia fenestro. Ĝi estas granda arbo. Provizore mi ne povas konstati ĝian nomon kaj rangon, ĉar eĉ unu folio ne informas min pri tio kaj mi ne iĝis pli scienca eĉ en la klasika patrujo de Linné pri tiu studfako, sed efektive ni estas amikoj kaj antaŭ du minutoj diris al mi la granda kaj estiminda arbo: »Ne ŝercu, knabo, mi estas jam trans la junecaj vantaĵoj, iom mi atendas, antaŭ ol surmeti la verdan kostumon. Cetere mi volas atendi iomete por ekscii, ĉu vere la verdo estos la moda koloro.»

Sed la junularo jam decidis aranĝi la printempajojn kaj forvaporas ĉio, kio dum la vintro ligis la junulojn al la ĉambro. Baldaŭ la kursoj perdos sian efikon al la eksierordinare sciema sveda junularo kaj sekvos novaj studoj, la studado de la luno kaj ĉielo kaj aliaj mirindaĵoj, al kiuj estas necesaj minimume kaj maksimume du, laŭeble ne samseksaj homoj. — Mi mem provis akcepti la batalganton, ĵetitan al mi de la printempo kaj mi translokis antaŭ tri semajnoj unu el miaj kursoj en la pompan studejon de la marborda naturo kaj tiamaniere mi sukcesis pruvi al miaj gelernantoj — per mia kaj ilia bluiĝintaj nazoj — ke tiutempe estis tro frua la printemp-jubilo; sed jam nun estas absolute certe, ke la Esperanto-kurso ne longe povos resti triumfanta kontraŭ la sorĉo de la Printempo.

Ne miru, Onklino, ke la skandinavia junularo tiom rapide ekatakas la printempajn plezurojn, pli avide kaj pli frue, ol niaj gejunuloj. — Certe vi aŭdis pri la skandalo de Stavisky, sed tiu afero estas bagatelo rilate al tiu ŝtelo, kion la cetere alloga skandinavia naturo faris je la malprofito de la simpatia ĉi tiea junularo. Ĉu vi ne komprenas? Tuj mi klarigos al vi la aferon. Unue estas la tre bela, sed tre longa kaj malvarma vintro kaj poste venas la, eĉ pli bela, sed tre mallonga somero, *kiam ne estas nokto*, nur anstataŭe iu nedifinebla, mistera malsereno dum la noktaj horoj. Ĉu vi komprenas jam? *La plej granda skandalo de la historio! Oni ŝtelis la someran mallumon de la sveda junularo*, oni ŝtelis la nigron de la someraj noktoj, oni ŝtelis la stelojn kaj la lunon kaj tio estas la kaŭzo, ke la kompatindaj gejunuloj estas devigitaj eluzi la frostan mallumon de la fruprintempaj vesperoj, oferante la naturan koloron de siaj nazoj. En la fino de Majo vane ili serĉus jam la lunon kaj la stelojn

Tamen ne tro ektimu, Onklino, kaj ne diru, ke vi ne venos en landon, kie ne estas nokto, ĉar en aŭgusto la situacio ne estas tiom danĝera kaj la zorgema kongresaranĝantaro reakiros almenaŭ parte la noktan mallumon. Ne diru, ke ĉiam mi »sentaŭgumas»; ĉu mi skribu pri alia témo?

Do, unue: kiam la sveda ŝipo ĉe Sassnitz enstomakigos vian vagonaron kaj vi daŭrigos tie vian vojaĝon al la mirinda kongresurbo, neniukaze forgesu, ke

la svedoj ne trinkas kafon kun lakto, sed ili uzas kremon al la kafo, sekve ne verŝu la tutan altabligitan kremkvanton en vian kafon, ĉar se vi faros tion, mi garantias, ke dum du semajnoj ĝemante vi insultos la paganan landon, kien la fatalo gvidis vin, dume la malpli forgesemaj eksterlandanoj, de Eskimujo ĝis Kanibalujo gaje flirtos inter si.

Kompreneble ne malutilos, se vi kunportos vian printempan surtuton, sed tute trankvile vi povos hejme lasi vian dudekkvin kilograman pelton. — Kaj ne miru konstatante, ke Stockholm malhavas la tendojn de la eskimoj kaj ne preparu vin dum via vojaĝo al la eskimeca salutmaniero, kiu okazas per la kunfroto de la nazoj. Kredu al mi, ke inter la svedoj kaj eskimoj estas ankoraŭ kelkmil-kilometra distanco. Sed aliflanke ne etendu vian manon sub la nazon de via korespondanto, kiu kun ĝoja »bonvenon» salutos vin ĉe via alveno, ĉar li certe ne komprenos, ke vi deziras lian mankison. La mankiso kiel salutmaniero estas tie ĉi nekonata kutimo, kaj mi estas tre feliĉa pro tio.

Kiam oni prezentas sin al vi, diru: dankon kaj cetere danku ĉiam, kiam vi ne dankus en Hungarlando: danku la svedojn, kiam ili diras: bonan matenon kaj speciale ne forgesu danki pro la *hieraŭa tago*; speciale vi povos akiri eksterordinaran popularecon kaj la titolon de ĝentila eksterlandano, se vi trovos aliajn pretekstojn por danko, ĉar la svedoj estas la plej dankema nacio sur la tuta terglobo. Kaj se oni dankas vin pro io, vi devas diri: dankon. Do danku la dankon, sed ne daŭrigu la dankon de dankoj, ĉar tiam la tuta kongreso forpasos per la reciproka dankado.

Ne konsterniĝu, se via kavaliro antaŭ vi en- aŭ eliras, ĉar tio signifas, ke li volas malfermi la pordon al vi kaj teni ĝin, ĝis via moŝto eliris aŭ eniris la ĉambron.

Sed: se vi renkontas samideanon, kies fileto estas vigla, gaja, petola kaj afabla, ne diru, ke la knabeto estas vigla, kiel la diablo mem, ĉar tiam vi neniam reiros al bela Hungarlando. La afabla samideano certe sufokos vin en la bluan akvon de la belega Melarlando. Ĉar la vorto »diablo» en Svedlando estas egalvalora al la plej grasaj kaj aromaj hungaraj blasfemoj kaj pro tio estas rekomendinde ne tro ofte uzi tiun ĉi bel-

Propagando per kinoj.

La Sveda Film-Industrio posedas kinojn tra la tuta longa Svedlando. Kaj en tiuj kinoj estas prezentataj antaŭ ĉiu filmo specialaj reklambildoj kun kanto, muziko kaj parolo. Mi rimarkis, ke tiuj reklambildoj estas tre ŝatataj de la publiko, ĉar ili estas ofte vere bone faritaj. Kial ne havi similan reklamon ankaŭ por Esperanto? Grandega nombro da homoj vidus ĝin kaj certe ĝi postlasus bonan efikon, se ĝi estus bonguste farita. Eluzu la plej modernan kaj efikan manieron por la propagando! Kompreneble, tio kostus ne malmulte da mono, sed SEF ja havas specialan propagandan fondon kaj ankaŭ la tutlandaj gesamideanoj ne rifuzus subteni mone tian entreprenon.

H. Seppik.

Av barns och spenabarns mun...

Då nu denna kurs är avslutad, vill jag åt Svenska Esperanto-Förbundet och åt dess lärare uttrycka mitt stora tack. Jag skall rekommendera deras kurser för alla mina vänner och bekanta. Jag har kanske inte löst uppgifterna så bra, men jag skall tala om att jag endast är 12 år. Detta visar att eder kurs är *mycket* lättfattlig. Än en gång mitt stora tack.

Högaktningsfullt

Sven Wester

Åhus Kärr, Olseröd.

sonan esperantan vorton en la lando de la vikingoj.

Kiam oni renkontas vin kaj demandas pri via farto, respondu, ke vi fartas bonege. Vi vidos, ke la svedoj donas similan ekzemplon. Mi ja diris, ke ili estas la plej ĝentila nacio sur la terglobo kaj kiam ili diras: mi fartas bonege — signifas laŭ mia analizo: Mi fartas bonege, sed ĉu estas eble malbone farti, kiam mi havas bonŝancon renkonti vin?

Mi kredas, ke hodiaŭ vi sufiĉe multe lernis de mi kaj tial mi finas mian leteron, kiu espereble trovos vin en la plej bona sanstato. Via fidela nevo

Francisko.

Facila programo por unu tago en Stockholm.

Vojaĝo sen fiksitaj horoj.

La gazeto Sv. Dagbladet, Stockholm, okazigis konkurson temantan pri »Unu tago en Stockholm». Jen ni represas unu el la premiitaj artikoloj. Verkis ĝin Gustaf Hillerström.

»Mi supozas, ke nia vagonaro alvenas al Stokholmo je la 7,30 h. Urba komisiisto portas nian pakajon al hotelo, kaj ne ligitaj de iu antaŭfiksitaj programo ni komencas rigardi Stokholmon.

Unue ni iras al la Urbodomo. La ĝardeno kuŝas en radiantanta sunlumo. Ekzistas neniuj homoj tie. La roso ankoraŭ ne forvaporigis. La floroj bonodoras. Ni aliras al la balustrado kaj rigardas al Söder (Suda Urboparto), kiu estas envolvita en bluegriza sunnebulo. — La memorriĉaj konstruaĵoj de Riddarholmen (Kavalira Insuleto) aspektas respektindaj kontraŭ la trembrila akvo de l' Mälars-lago.

Poste ni promenas eksteren tra Kungsholmen (Reĝa Insulo), rigardas la magistratan domon kaj la garnizonan hospitalon. Granda ruĝa aŭtobuso, »Drottningholm» estas skribite sur ĝi, haltas tute apud ni. Kaj ni eniras. Agrabla veturo tra antaŭurboj kaj vila-urbetoj, kie la ĝardenoj staras en plena florado.

Drottningholm (Reĝina Insuleto) kuŝas en blua matena nebuleto. Eble kontraŭ nia supozo ni rajtas eniri kaj en la palacon, kie ni admiras la mirindan bibliotekon, kaj en la teatron, kiu vere valoras duoblajn stelojn en Baedeker. La gracia melodio de rokokomenueto ripozas super la malgranda salono.

Bonege gustas matenmanĝo en la gastejo de Drottningholm.

Ĉirkaŭ la 11-a horo ni denove estas en Stokholmo. Ni iras tra la stratoj, en kiuj nun svarmas homoj, kaj vizitas kelkajn vendejojn. — Hötorget (vendoplaco) kuŝas antaŭ la grizverda fasado de l' Koncerta domo kiel giganta purpurkolora floro. Eĉ ĝis la Urba biblioteko ni vagpromenas, sed nek ĝi nek la Komerca altlernejo kapablas elogi el ni iajn ek-kriojn de raviteco.

Engelbrektskyrkan (Preĝejo de Engelbrekt) neniom gajnas ĉe pli proksima rigardado, sed la Teknikan altlernejon ni trovas impona. La fontanon de

Milles »al la dua simfonio de Alfvén» ni rigardas kiel unu el la plej grandaj vidindaĵoj de Stokholmo.

Sturegatan kaj Birgerjarlsgatan estas larĝaj, grandurbecaj stratoj. La laste nomita eĉ elspiras iom da pariza bulvardo.

Bongustan lunĉon ni ricevas en Bäckahästen («Niksoĉevalo»). Ni sidas ekster, kaj rekte kontraŭe ni havas la parkon de Berzelius, kie fontano plaŭdetas freŝige en la varmego.

Post la lunĉo ni daŭrigas la promenadon kaj post mallonga tempo ni estas ekster la Nacia muzeo. Ni eniras kaj rigardas la holandan arton de l' 17-a jarcento. Rembrandt eble plej forte logas nin. Kaj antaŭ ol forlasi la muzeon ni ankaŭ admiras la madonon de Viklau.

Kiam mi preteriras la Operejon, ni vidas ke vespere oni prezentos »Bohême.» Kaj ni tuj decidis pasigi la vesperon en la Operejo.

Sur Norrbro (Norda ponto) ni devas halti por rigardi la viglan vivon. La insularaj ŝipoj kuŝas pretaj por ekiro. Estas pelado kaj urĝeco, festa urĝeco.

La Reĝa Palaco ravas nin nedireble, sed bedaŭrinde ni ne havas tempon por rigardi ĝian internon. La malnovan magistratan domon kaj la Nobelaran domon ni ankaŭ rigardas nur de ekstere, dum ni transiras al Riddarholmen. — Silente ni ĉirkaŭiras inter la tomboj en Riddarholmskyrkan, en la Panteono de Svedujo. —

La Malnova urbo meritas tutan tagon. Nun fariĝas nur rapida tramigro. Ni admiras la Borson kaj de temp' al tempo haltas antaŭ iu speciale pompa baroka portalo.

La tagmanĝon ni kompreneble prenas en Gyllene Freden («La Ora Paco»). Ni permesas al ni sufiĉe da tempo kaj ĝuas la impresplenan ĉirkaŭaĵon kaj la bonan manĝaĵon.

Manĝinte ni estas komfortemaj kaj prenas aŭton al la hotelo, kie ni ripozas iom kaj ŝanĝas vestojn. Kaj poste per aŭto al la Operejo.

Plena salono. Bonvestita, internacia publiko. La ardaĵ »kantilenoj» kaj sopiremaj amarioj de Puccini estas kantataj kun sudlandana vervo de eksterordinaraj kantistoj.

En nekovrita aŭto ni poste veturas al Hasselbacken (restoracio), Strandvägen kaj Djurgårdsslätten estas nigraj de homoj. Ĉie oni aŭdas muzikon.

Ni ricevas tablon, vespermanĝas kaj

La rekta metodo

en la lingvoinstruado estas konsiderata tre moderna. Ĉie ni renkontas pedagogojn, kiuj malrekomendas la »antikvan» gramatikmetodon.

Ankaŭ rilate al Esperanto la avantaĝoj de la rekta metodo estas reklamataj kiel la solvo de la instruado. Ni ne povas nei, ke unu el la plej gravaj kialoj de la hodiaŭa bona stato de la esperantomovado en Svedujo estas rezultato de la laboro de la eksterlandaj instruistoj, kiuj per helpo de la rekta metodo sukcesis vekti la dormantan intereson pri Esperanto en vastaj rondoj. La metodo estas tre bona. En amuza maniero kaj relative facila ĝi kapabligas la disĉiplojn praktike uzi Esperanton.

En la komenco de jaro 1880 lingvistoj en ĉiuj landoj ekpropagandis la rektan metodon. La »nova» metodo celis al tio, ke la disĉiploj studu fremdajn lingvojn kiel infano lernas la gepatran; oni lernu parolante, ne gluante sekajn gramatikajn regulojn kaj senvivajn vortamasojn.

Ĉio »nova» renkontas kontraŭulojn. Sed iom post iom la metodo akiris pli kaj pli da anoj.

Tamen estas erare kredi, ke la »nova» metodo efektive estas nova. Nenio nova sub la suno, jam la roma popolo diris. Tio ŝajnas esti vera prijuĝo, almenaŭ rilate al la rekta metodo.

La rekta metodo estas tre malnova.

Dum la mezepoko la latina lingvo estis instruata rektmetode en la monaĥejoj kaj aliaj lernejoj. Tiel konsekvence oni instruis, ke tiu knabo, kiu hazarde

dancas. — La ĉampanboteloj estas malŝtopataj kaj en la aero zumas eksterlandaj vortoj. La orkestro sordine ludas suĉan tangon.

Kaj antaŭ kiam mi denove forvojaĝas, ni suprenveturas al Söder kaj rigardas la urbon, kiu kuŝas etendita sub niaj piedoj. Estas duonlume. La Urbo domo siluetas kontraŭ la bluenigra ĉielo. La lanternoj lumas kiel longaj perl-rubandoj. La aero estas plena de muĝo, la unutona murmuro de l' trafiko, muziko kaj homaj voĉoj.

Tradukis B. Gerdman.

ekdiris nur unu vorton el la gepatra lingvo, estis severe punata.

Post kiam la latina perdis la pozicion kiel universala lingvo de la kleruloj kaj sciencaj homoj, la profesoroj ekinstruis per gramatiko kaj vortaroj.

La rekta metodo estis forgesata. Spertaj pedagogoj provis trovi aliajn taŭgajn vojojn per pli malpli bonaj lernolibroj.

Kiel tre bona ekzemplo povas esti menciata »Orbis pictus» (La mondo en bildoj), lernolibro, kiun verkis la fame konata pedagogo Johann Comenius (1592—1670). Ĝi estas la unua ilustrita lernolibro kaj do la pralibro de la hodiaŭaj bildornamitaj lernolibroj.

La penso pri la rekta metodo renaskiĝis en la fino de 1700. Unu el la ĉefuloj de la pedagogia mondo, la germano Johann Basedow, komprenis la valoron de la rekta metodo, sed liaj klopodoj kaj tiuj de liaj anoj ne kapablis reformi la lingvoinstruadon.

Pasis jarcentoj. La amerikano Berlitz estas la plej konata pioniro de la rekta metodo. La unua lernejo estis fondata en Providence, USA, en la jaro 1878. Li efektivigis la malnovan forgesitan ideon kaj per sia amerikana energio li sukcesis grandstile. Nuntempe tiaj lernejoj estas trovataj en la tuta mondo.

Kara infano havas multajn nomojn. Tiel estas rilate al la rekta metodo. Hodiaŭ la metodo triumfis eĉ en lernejoj, kie ĝis nun la plej osta lingva konservativismo regis.

Sed ni memoru, ke malgraŭ la floranta intereso de la hodiaŭo la rekta metodo ne estas nova. Estas nur tiel — kiel ofte okazas — ke la homoj post malsukcesoj kaj malbonaj spertoj fine retrovis la forĵetitan angulŝtonon kaj nun ekkomprenis ĝian grandan valoron.

Einar Dahl.

— ★ —

Ett tusen medlemmar i esperantisk radioklubb.

Radio-Club Espérantiste de France har nu uppnått ett medlemsantal av 1000, vilket väl för en esperantisk förening av specialkaraktär får anses vara en rätt anmärkningsvärd siffra, så mycket mer som föreningen därtill ej är internationell.

LIBERA ANGULO

Fridolf Rhudin en Esperanto!

Sidante en kino kaj ĝuante la majstroverkojn de la sveda sonfilmo (Pojkarna på Storholmen, Kära släkten, Vi som går köksvägen, ktp.) mi ĉiam tre bedaŭris, ke pro lingvaj baroj tiuj bonaj filmoj povas esti prezentantaj kaj ĝueblaj nur en Skandinavio. Eĉ se oni sukcesus vendi kopion de tiuj filmoj al aliaj landoj, ili ne povus havi sukceson kaj ne povus populariĝi, ĉar ili ja estas 100 % parolfilmoj kaj la sveda lingvo ne estas komprenebla eksterlande. Se ne estus tio, mi estas certa, ke la svedaj filmoj rikoltus grandan sukceson en la aliaj eŭropaj landoj. Sed mi tute ne kredas, ke la Sveda Film-Industrio sukcesus solvi la problemon per la angla aŭ germana lingvo — estus tro granda laboro por la aktoroj fundamente ellerni tiujn lingvojn kaj certe ili ne sukcesus havi senripoĉan prononcadon.

Sed kial ne provi per Esperanto? Sub lerta gvidado la aktoroj dum relative mallonga tempo ellernus la lingvon kaj Esp. estas jam sufiĉe populara en Eŭropo, por ke filmoj en tiu lingvo havu sukceson. Des pli, ke granda parto da vortoj en Esp. estas facile kompreneblaj en pli-malpli ĉiuj landoj kaj pro tio oni ĝuos esperantan filmon multe pli ol ekz. anglan kaj eĉ germanan. Cetere, por ankoraŭ pli faciligi la komprenadon, oni povus kompili la tekston de la filmo el laŭeble internaciaj vortoj kaj la aktoroj parolu klare kaj malrapide. Kompreneble la esperantistoj kaj la esperantaj organizoj en la tuta mondo farus ĉion, por sukcesigi tiun filmon.

Mi supozas, ke la filmistoj estas ankaŭ lertaj kaj antaŭvidemaj komercistoj kaj certe komprenus la avantaĝojn de esperanta filmo, se oni bone klarigus al ili la aferon. Jen bona tasko por la gvidantoj de nia movado! Sed oni devas lerte kaj prudente agi. Oni ne postulu idealismon de la praktikaj filmistoj kaj komercistoj, sed oni pruvu al ili, ke ili nepre bezonas Esperanton, por ke la vere arta sveda filmo trovu al si vojon en la mondon.

H. Seppik.

— ★ —

Sekretoj

de la Esperanta gramatiko.

H. Seppik.

1.

Jaså, ĉu la Esperanta gramatiko havas sekretojn? La esperanta gramatiko, kiu estas tiel simpla kaj facila kiel kartludado aŭ ŝako? Jes, kompare kun tiu de la aliaj lingvoj la esperanta gramatiko estas vere tiel simpla kaj facila, ke oni povus prave diri, ke Esperanto tute ne havas gramatikon. Lernu la deklinadon de la germanaj substantivoj, lernu la francajn kaj italajn verbojn, lernu la anglan elparoladon kaj frazkonstruon, tiam vi scias, kio estas gramatiko! Sed Esperanto estas vere simplega kaj facil-ega.

Tamen en Svedlando mi ofte aŭdis plendojn, ke la Esperanta gramatiko estas tro malfacila, ke oni ne komprenas jen la akusativon, jen la participojn. Nu, tiuj personoj certe *neniam* sukcesus ellerni la francan, germanan, anglan aŭ iun alian lingvon, ĉar tiuj estas minimume dekoble pli malfacilaj ol Esp.

Al mi ŝajnas, ke la malfacilaĵoj ĉe la lernado de Esp. venas ĉefe de tio, ke 1. oni ne havas sufiĉe da intereso kaj energio, kaj ke 2. la gepatra lingvo malhelpas. Mi observis, ke almenaŭ 90 % de la eraroj, kiujn faras la komencantoj (kaj ankaŭ aliaj), estas kaŭzitaj ne de la »malsimpleco» de Esperanto, sed de la gepatra lingvo (en Svedlando de la sveda, en Norvegio de la norvega, en Estonio de la estona ktp.). Vi ne kredas? Sed rigardu! Por la estonoj, finnoj, rusoj, poloj kaj germanoj la akuzativo ne prezentas malfacilaĵojn, kiel por la svedoj, ĉar ili havas ĝin ankaŭ en sia lingvo. Por la estonoj, finnoj, germanoj kaj aliaj la participoj estas tre facilaj. Sed, male, por la rusoj, finnoj, poloj kaj estonoj la artikolo (»la») estas tre malfacila, ĉar en tiuj lingvoj mankas artikolo. En Svedlando oni devas ofte batali kontraŭ la formoj »havas skribis», »havas vidis» ktp., sed en Estonio oni neniam renkontas tiaĵojn. Kial? Tute simple: ĉar ankaŭ en la estona lingvo ili ne ekzistas. La norvegaj komencantoj ofte skribas »kai», »bonai libroj» ktp., sed tion neniam faras la svedoj. La estonoj ofte luktas kun la vortoj »benko, butiko, donas» ktp, ĉar laŭ la reguloj de la

estona lingvo ili tre emas skribi tiujn vortojn »penko, putiko, tonas».

Mi esperas, ke per tio ĉi mi sufiĉe pruvis mian argumenton, ke la plej granda parto de la malfacilaĵoj ĉe la lernado de Esp. estas kaŭzita de la gepatra lingvo de la lernantoj, ne de la imagita »malfacileco» de Esperanto. Ofte mi rimarkis ankaŭ tion, ke la sama persono, kiu parolas kaj skribas tre klaran kaj elegantan Esperanton, tuj ekfaras erarojn kaj fabrikas strangaĵojn, kiam li tradukas el sia gepatra lingvo. Do — plia pruvo por mia argumento. Pro tio mia konsilo ĉiam estas: lernante Esperanton forgesu la gepatran lingvon, forgesu la svedan lingvon, ĉar ĝi nur malhelpas al vi, ĝi nur komplikas la aferon. Pro tio mi ankaŭ trovas, ke la rektmetodaj kursoj estas la plej taŭgaj por komencantoj, ĉar tie ili devas pli-malpli liberiĝi de la gepatra lingvo. Tamen kun bedaŭro mi konstatis, ke ne ĉiuj emas tion fari, sed estas sklave katenitaj al sia gepatra lingvo kaj nepre volas, ke Esp. havu precize la samajn regulojn kiel ilia gepatra lingvo. Kaj se ofte tiel ne estas, ili sentas sin seniluziigitaj kaj ekkredas, ke Esp. estas »malfacila».

Pro la supraj konsideroj mi ne povas konsenti kun la ofta aserto, ke oni devas bone koni la gramatikon de la gepatra lingvo, por lerni tiun de Esperanto. Vi jam vidis, ke la gramatikoj ne estas egalaj kaj ofte la gepatra lingvo nur malhelpas la lernadon de Esperanto. Ne, devas esti tute male: *unue* oni lernu kaj komprenu fundamente la simplan, logikan kaj rektlinian gramatikon de Esperanto, kaj *post tio* la malsimplan, nelogikan kaj kaosan gramatikon de la gepatra lingvo. Tiam la lasta estos multe pli facila kaj komprenebla, ĉar per Esp. la lernanto ekhavis klaran bildon pri modela gramatiko. Bedaŭrinde unu parto de la svedaj instruistoj ne havas la saman opinion: anstataŭ instrui al siaj Esperanto-lernantoj la simplan Esperanton, ili enkondukas la lernantojn en la labirintojn de la sveda gramatiko kaj vole-nevole sugestas al ili ke Esp. estas malfacila. Tute malprave kaj erare! Se oni nepre volas uzi la svedan lingvon, tiam nur en tiu maniero, ke oni *ilustras per svedaj ekzemploj la Esperantajn regulojn* kaj ankaŭ klarigas la similecojn kaj diferencojn inter ambaŭ lingvoj.

2. INTERNACIA STILO.

Foje, mi kredas en Eskilstuna, mi trovis en skribaĵo de mia kursano jenan frazon: »Kiel staras ĝi al?» Nature mi nenion komprenis, kaj neniu esperantisto povas kompreni tian esprimon, kvankam ĝi ja estas gramatike tute rekta. Nu, mi fariĝis tuj suspektema, mi prenis »la flavan libreton» kaj post mallonga serĉado mi havis la jenan svedan frazon: Hur står det till?» Tion komprenas ja ĉiu svedo kaj en bona Esperanto ĝi signifas: »Kiel vi fartas?» Poste mi al kutimiĝis al tiaj aferoj kaj se mi ion ne komprenas, mi tuj serĉas helpon de la sveda lingvo, ĉar tiaj misteraĵoj ordinare estas laŭvortaj tradukoj.

Sed kial do »hur står det till» estas bone komprenebla en la sveda lingvo, sed »kiel staras ĝi al» ne estas komprenebla en Esperanto? Same multaj aliaj svedaj esprimoj? Tute simple: la sveda lingvo ne estas logika (same kiel neniu nacia lingvo), ĝi ne sekvas la regulojn de la racio, sed tiujn de la kutimo, de la tradicio. Ĉiu nacia lingvo havas siajn kutimojn kaj tradiciojn kiuj ofte faras la esprimon nekomprenebla por eksterlandano kvankam la unuopajn vortojn de la frazo li bone komprenas. Tute klasika en tiu rilato estas la latina lingvo sed ankaŭ en la angla kaj aliaj modernaj lingvoj tiuj »idiotismoj» abundas. Jen kio faras ankaŭ la anglan lingvon tre malfacila por pli-malpli perfekta ellernado, kvankam ĝia gramatiko estas relative simpla. Tiujn idiotismojn oni devas lerni parkere (ili estas multaj!).

Sed Esperanto ne havas tiajn »idiotismojn» — jen grava kaŭzo, kial ĝi estas multe pli facila ol iu alia lingvo. Esperanton ne regas la tradicioj, sed sole la logiko kaj racio. Kio estas logika, racia kaj klara, tio estas bona en Esperanto, kio estas nelogika, neracia kaj malklara, tio estas malbona, kvankam ĝi povas esti gramatike tute ĝusta. Jen la sola regulo por la esperanta *internacia stilo!* Zamenhof mem diris: »La vera stilo esperanta estas nek slava, nek germana, nek romana, ĝi estas — aŭ almenaŭ devas esti — nur stilo simpla kaj logika.» Sekve por skribi bonan internacian stilon en Esperanto, oni ne bezonas koni la germanan, francan, anglan aŭ iun alian lingvon, sed nur Esperanton mem kaj ĝian spiriton, ĝian animon, kaj oni

devas havi la kapablon logike pensi. Sed tion vi ja havas, ĉu ne? Kompreneble, scipovante kelkajn lingvojn krom sia gepatra, alivorte, estante lingve klera, oni povas pli facile kaj pli elegante esprimi sin, ne nur en Esperanto, sed ankaŭ en sia gepatra lingvo.

Kio estas la rezulto, se oni neglektas la logikan pensadon kaj ne havas sufiĉe da respekto al la spirito kaj reguloj de Esperanto, se oni blinde volas imiti la gepatran lingvon, tion klare ilustras letero, kiun D-ro Zamenhof iam ricevis de rusa komencanto (Lingvaj respondoj, paĝo 79):

»Favora Regnestro! Honoro havas alkuŝigi, kiu laŭ kaŭzo de antaŭskribita al mi kun kuracisto kuraco mi en efektiva tempo ne en stato elpleni de donita kun mi al vi promeso; apud kio postaperigas, ke mi turnos sin al domo tra du monatoj, ne pli frue de fino de Aŭgusto.»

Ĉu vi komprenas? La letero estas ja gramatike kaj vortare senerara! Jen ĝia »traduko» en vera Esperanto!

»Estimata sinjoro! Mi havas la honoron raporti al vi, ke kaŭze de kuracado, rekomendita al mi de la kuracisto, mi en la nuna tempo ne povas plenumi la promeson, kiun mi donis al vi; mi ankaŭ sciigas vin, ke mi revenos hejmen post du monatoj, ne pli frue ol en la fino de Aŭgusto.»

Se svedo agas laŭ la sama maniero (sufiĉe ofte mi rimarkis tian emon) lia letero ne estus pli komprenebla. Ekz.:

»Plej bona fraŭlino Lundqvist!

Tie ĉi kun ŝafo mi kundividi, ke por unu paro tagoj post ricevis mi okazmaniere vidon sur tiun tie libron vi parolis pri ke havi serĉis super ĉio en Karlstad, sed povis ne malmulte preno en. Viro havas ĝin tie ĉi ĉe Qvidings. Pri vi rapidveturante volas havi ĝin, volis mi multe volonte lasi sendi vin ĝin pr fostaantaŭ pafo. Unu fojon al: intiman dankon por via amikeco kaj zorgemo se mi sub mia malsaneco en Karlstad.

Via aldonita Henning Nilsson.»

Sed ĝia laŭvorta sveda traduko estas senriproĉa:

»Bästa fröken Lundqvist!

Härmed får jag meddela, att för ett par dagar sedan fick jag händelsevis

syn på den där boken Ni talade om att ha sökt överallt i Karlstad, men kunde icke få tag i. Man har den här hos Qvidings. Om Ni fortfarande vill ha den, vil le jag mycket gärna låta sända Eder den pr postförskott. En gång till: innerligt tack för Eder vänlighet och omsorg om mig under min sjuklighet i Karlstad.

Eder tillgivne Henning Nilsson.»

Kaj jen la preciza traduko en bona Esperanto:

»Ŝatata fraŭlino Lundqvist!

Per tio ĉi mi sciigas al vi, ke antaŭ kelke da tagoj mi hazarde ekvidis tiun libron, pri kiu vi parolis, ke vi serĉis ĝin ĉie en Karlstad, sed nenie povis trovi. Oni havas ĝin tie ĉi ĉe Qviding. Se vi ĉiam ankoraŭ volas ĝin ekhavi, mi volonte sendigus ĝin al vi poŝtrepape. Ankoraŭfoje: koran dankon pro via afableco kaj zorgemo pri mi dum mia malsaneco en Karlstad. Via sindona Henning Nilsson.»

Do vi vidas, kiel granda diferenco estas inter la diversaj stiloj! Laste ankoraŭ unu laŭvorte tradukita »perlo» el la estona lingvo:

»Mi instigis kun piedrado preter teon. El mortintĝardeno preterveturante fajro al mi mortintvagonaro sur teo kontraŭ. Viroj portis lignoĉemizon sur ŝultroj kaj preĝeja sinjoro paŝis antaŭ de ĉio. Al mi fajro ankoraŭ peco da tero veturi kaj hejme alvenante mi estis kun siaj tra. Sed vitro da fajra vojo kaj kano da blanka pano donis al mi vivon ree returne. Vespere mi metis ĉapelon ree en kapon kaj mantelon en dorson kaj iris el. Literoj ŝajnis en ĉielo kaj mondo estis kvieta.»

En bona Esperanto:

»Mi rapidis per biciklo laŭ la vojo. Kiam mi preterveturis la tombejon, venis survoje al mi renkonte funebna procesio. Viroj portis la ĉerkon sur la ŝultroj kaj la pastro paŝis antaŭ de ĉio. Mi devis veturi ankoraŭ sufiĉe multe kaj alveninte hejmen mi estis tute elĉerpita. Sed glaso da varmega teo kaj granda peco da blanka pano redonis al mi la vivon. Vespere mi denove surmetis la ĉapelon kaj mantelon kaj eliris. Steloj brilis en la ĉielo kaj la vetero estis senventa.»

Kio estas "Viva Gazeto".

En la kronikoj pri la kunvenoj de Grupo Esperantista de Stokholmo vi ofte legis ke aperas "Viva Gazeto". Eble ekzistas multaj personoj, kiuj ne certe scias, kio "Viva Gazeto" estas. Tamen tiu programpunkto estas unu el la plej bonaj kaj plej intruantaj punktoj, kiujn kluba estraro povas aranĝi. Mi ĉi tie provos per malmultaj vortoj klarigi kio estas "Viva Gazeto". En kunveno oni elektas redaktoron, kiu poste havigos artikolojn. La artikoloj konsistas el membroj, kiuj promesas kunlabori en la gazeto. Ekzemple la redaktoro kunvokas 10 personojn. Al ĉiu li diru, kion li faru dum la aperado de la gazeto. La unua artikolo povas konsisti el poemo, kiun la elektito laŭtlegas aŭ deklamas, en la dua iu povas rakonti pri interesa travivaĵo kaj la tria laŭtlege kelkajn anekdotojn ktp.

Mi proponas ke ĉiu kunlaboranto parolu nur kvin minutojn. Tiam la aŭskultantoj aŭdas plurajn voĉojn kaj la gazeto fariĝas pli vigla. Kiel kunlaborantojn oni unue elektu personojn, kiuj ne tre bone scipovas la lingvon. Antaŭ la apero ili devas sin prepari, lerni anekdoton, poemon aŭ simile. Tio estas tre bona ekzercado en la lingvo kaj mi forte rekomendas la metodon al ĉiuj kluboj en la lando. Per tio oni kreas lertajn esperantistojn kaj la tuta esperantistaro gajnos per la afero. Tial, geklubanoj, aperigu "Vivan Gazeton"!

S. H-son.

Sekve, se ĉiu popolo dezirus, ke Esperanto estu precize egala al ĝia lingvo, oni ne sukcesus plu komprenigi sin per tiu lingvaĵo al eksterlandanoj kaj Esp. ne povus plu plenumi sian rolon de internacia lingvo. Penetru do en la spiriton de Esp. kaj lernante kaj uzante ĝin forskuu de vi la katenojn de via gepatra lingvo! Pensu logike kaj sekvu la simplajn regulojn de Esperanto!

RIMARKO: Por komparo kun la sveda kaj norvega »kiel staras ĝi al» mi aldonas laŭvortajn tradukojn de la sama esprimo (kiel vi fartas) el kelkaj aliaj lingvoj. Estona: kiel mano iras? finna: kiel vi povas? rusa: kiel aferoj? germana: kiel iras ĝi? franca: tiel iras li? angla: kiel vi faras?

En rekommendation för världsspråket och den direkta metoden.

F.d. rektor J. F. Falk har i Nya Dagligt Allehanda gjort följande uttalande:

»I fråga om språkundervisningens metod, ger jag avgjort företräde åt den direkta (quosque-tandem-metoden) notabene under förutsättning att vederbörande lärare har den därför erforderliga kompetensen, så att han behärskar både språket i fråga och metoden. Är detta icke fallet, torde han göra bäst i att gå en medelväg. Att på ett förståndigt sätt så mycket som möjligt använda det främmande språket i klassen, måste ju dock alltid anses nyttigt. Användes den direkta metoden, måste den grammatiska säkerheten dock alltid beaktas.

Den som sett de resultat som vunnits av t. ex doktor Elfstrand i engelska och pastor Cseh i esperanto torde emellertid obetingat giva deras metod företräde, då det gäller att åstadkomma förmåga att uppfatta språket samt att tala, läsa och skriva detsamma. Sant är, att engelska och esperanto äro språk, som genom sin enkla grammatik lämpa sig synnerligen väl för den direkta metoden. Tyska och franska ställa sig något svårare, men även i dessa språk har jag sett den direkta metoden användas med gott resultat.

För min inre syn hägrar en framtidsbild, i vilken för alla länder språkbelastningen minskas därigenom att ett världsspråk, utan att inkräkta på de nationella språken, tjänstgör som hjälpmedel i det internationella umgänget.

Äppelviken i februari 1934.

J. F. Falk.

Bysslands

bägge storstäder Leningrad och Moskwa och esperantisterna där besökas under de turistresor, som avgår från Stockholm den 30 juni och 11 aug. Återkomst till Stockholm den 10 juni f.m., resp. 21 aug. f.m. Priset för hela resan uppgår till kr. 296:—. I priset ingår samtliga resekostnader och dessutom full pension i Leningrad och Moskwa samt gratis inträde å museer o.s.v. i dessa städer.

Tillskriv:

ESPERANTA TURISTA KOMISIONO
Heleneborgsgatan 6, Stockholm.

LIBROJ KAJ GAZETOJ

ATENDINDA LIBRETO. Mi ĵus konatiĝis kun nova esperanta libreto el Japanujo. La titolo estas "Japanaj fabeloj". Eldonis ĝin eldonejo Kokobunŝa, Tokio. Prezo ne estas montrita, sed ĝi ne povas esti tre alta, ĉar la libreto, inkluzive enkondukon kaj postparolon, ampleksas nur 50 paĝojn.

Kvankam estas nur maldika volumeto, mi ne povas kontraŭstari la deziron atentigi pri ĝi. Precipe mi volas rekomendi ĝin al kursgvidantoj kaj gelernantoj.

La libro enhavas kvin japanajn fabelojn, kiuj entute ampleksas 35 paĝojn. Estas fabeloj ekskluzive por infanoj — specialaĵo de Japanujo, pri kio vi povos legi en la enkonduko. Tial ili estas tre ege simplaj rilate al stilo kaj rakontmaniero. Samtempe ili tamen estas tre vivoplenaj kaj ankaŭ plenaj de senco. Fakte ili apartenas al tre altnivela popola, buŝa literaturo. La lasta el la fabeloj eĉ atingas la nivelon de profunda kaj delikata poezio. Cetere la volumeto estas rekomendinda ankaŭ pro tio, ke ĝi rekte prezentas al ni la spiriton de la japana popolo, multe pli bone ol povis fari dikaj volumoj da priskriboj.

Sed unualoke mi pensas pri la simpla. La traduko estas ekzerce farita de kelkaj anoj de Japano Esperanto-Societo. Laŭstile ĝi estas bonega. Ekzistas kelkaj negravaj pres- kaj eble skriberoj, sed cetere ĉio estas senriproĉa. Estas trafaj kaj sencofidelaj vortoj. La lingvo kiel tutaĵo estas senafekta kaj natura, imitinda modelo por lernantoj. Japanismoj tute forestas. Ordinare mankas ritmo en japanaj esperantaj libroj, sed en tiu ĉi libro la ritmo estas plentone esperanta.

Estas bonega legaĵo por kursanoj kaj aliaj lernantoj, kaj la fabeloj rekte invitas al konversacio kaj rakontado. La libreto havas nur unu mankon: ĝi estas tro malgranda. Se ĝi estus kvar- aŭ kvinoble pli ampleksa ni havus mirindan legolibron por la esperantolernantoj de la tuta mondo. La tradukintoj pripensu tion je ev. nova eldono!

Stellan Engholm.

Maljuna samideano.

Kiu estas la plej maljuna esperantisto en la mondo? Jen demando sendube kun malfacilo respondita, sed mi supozas, ke la amerikana metodistpastro Benjamin Cory Miller estas unu el la plej maljunaj mondlingvanoj. Miller naskiĝis la 22-an de Januaro 1850.

Antaŭ kvin jaroj li okaze vidis esperantolibron, li interesiĝis kaj komencis studadi.

Per Esperanto li ricevis multajn amikojn tutmonde kaj li havas viglan korespondadon. Li ankaŭ skribas per la brajla metodo, kaj tre volonte deziras korespondi kun esperantaj geblinduloj.

Se iu leganto de tiu ĉi linioj konas blindajn samideanojn, mi petas lin instigi al ili sendi salutojn al nia maljuna esperantisto.

Lia adreso estas P. O. (A) Box 112
Great Neck N. I., U. S. A.

Lenko.

Belajn poŝtkartojn kun esperanta teksto pri la malnova universitata urbo Lund (12 malsamaj) pretigis la tiea esperantoklubo por vendado nun kaj dum la antaŭkongreso. Korespondante kun la eksterlandaj samideanoj uzu la esperantotekstajn kartojn por montri kiel bela estas nia sveda lando. Vi ŝparas tempon uzante la kartojn kun precizaj informoj pri la bildo. Tuta serio kostas nur 1.50 inkl. la sendkostojn. Vidu anoncon!

(Daŭr. de paĝo 84.)

klarigoj en Esperanto. Ni devas paŝi antaŭen kune kun la civilizita mondo kaj uzi Esperanton. Se ĉiu turisto sciis Esperanton tiam ekzistus internacia turismo, ĉar sen komuna, por ĉiu konprenbla lingvo la turismo ne atingos la celon.

Ni veturu, migradu, por ripozi, pro novaj impresoj, kaj ĉie ni uzu Esperanton; ĝi malfermas al ni la mondon, kaj tial ĉiu turisto devas scii la helpan, internacian lingvon, se ni vere deziras esti kvazaŭ frato al la fremdlanda turisto, kaj kunhelpi en la granda, belega ideo de interamikiĝo.

Oskar Berman.

TIL ESTLAND!

27 juni och 11 juli avgår resor från Stockholm till

Estland

Biljettpriser tur och retur I klass 60 kr.

| | | | | |
|-----|-----|---|----|---|
| D:o | II | „ | 40 | „ |
| D:o | III | „ | 30 | „ |
| D:o | IV | „ | 20 | „ |

Esperantisterna i Estlands huvudstad Tallinn komma att liksom under föregående år bereda de turistande det varmaste mottagande.

Estland bjuder på härliga bad- och rekreationsorter! Restaurang- och hotellpriser mycket låga.

Tillskriv:

ESPERANTA TURISTA KOMISIONO

Heleneborgsgatan 6, Stockholm.

Esperanto i Italien.

På förfrågan av ordföranden i Italienska esperantoförbundet, hr Marchese Cordero di Montezemolo, har undervisningsministern meddelat, att esperanto må förekomma som valfritt ämne på realskolestadiet.

Krucvortenigmo N-ro 4. Korekto!

Per bedaŭrinda hazardo ni pretervidis, ke en Krucvortenigmo n-ro 4 mankas la ŝlosil-vorto 21 vertikale, kiu devus esti »Piko». Ĉar jam alvenis multo da solvoj, ni devas aprobe akcepti ĉiun vorton taŭgan por tiu numero.

Pro tio ke aperas la maja numero de nia gazeto antaŭ la fino de la limtempo por ensendo de la solvoj de Krucvortenigmo N-o 4 ni prokrastas la enpresigon de la solvo de tiu ĝis la junia numero.

Rim. Ĉar kelkaj personoj ŝajne kredas, ke la unue alveninta ĝusta solvo gajnos la premion, ni devas informi, ke el ĉiuj alvenintaj solvoj ni lote tiras 3 solvojn kiuj, se ili estas korektaj, ricevos la premiojn. Sekve ankaŭ la laste alveninta havas la saman ŝancon kiel la unua.

Red.



*Den tunna, skarpa
hållbara men billiga
rakklingen heter*

D-ro Zamenhof.

Pris pr st. 0:20, 10 st. 1:75.

»Får härmed uttrycka min belåtenhet med rakklingorna. De äro de bästa som jag använt, det kan jag utan överdrift säga.

Ernst Ek, Stathmosvägen 2, Nynäshamn.»

Eldona Societo Esperanto s.p.r.
Box 698, Stockholm 1. Postgiro 578

El la recenzoj pri

Barbro kaj Eriko:

La ilustrita belaspekta libro enhavas leterojn de du junaj gesamideanoj: svedino kaj aŭstriano. En la lasta letero temas pri baldaŭa persona interkonatiĝo. Certe ĉi tiu libro estos kun intereso legata, precipe de novaj esperantistoj. La manuskripto estas reviziita de la rektoro de Sveda Esp. Instituto kaj de membro de la aŭstra ŝtata Esperanta ekzamenkomisiono.

(Informoj de Esperanto-Asocio de Estonio.)

Prezo 0:60 sved. kr.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO
Stockholm 1.

Propagandafonden:

Helmi Josefsson 5:40
M. Fejde, Nässjö 5:—
Sven Svedén, Borås 5:—

Förlagsföreningen Esperanto u.p.a.

håller ordinarie årsmöte annandag pingst den 21 maj kl. 10 f.m. å Stadshotellet, Södertälje.

Ärenden enligt stadg. § 11.

Konfirmering av vid 1933 års möte fattat beslut om ändring av stadgarna § 4 mom. 3 och § 14.

STYRELSEN.

Jaroslavo Haŝeh:

La travivaĵoj de la brava

Soldato Ŝvejk

dum la mondmilito.

Övers. från tjeckiska.

En satirisk berättelse riktad mot det österrikiska militärväldet i Tjeckoslovakien före och under världskriget.

152 sid. *Pris kr. 3:—.*

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO
Stockholm 1.

Korespondado:

S-ro Victor Rostopchin-Alimova, str. 23. Moskva-13. URSS — korespondas pri resanigo de nervoj kaj konscio, pri simpla vivo.

VÄRVA DELTAGARE i Svenska Esperanto-Förbundets korrespondenskurs!
Kursavgift endast 1 kr. 6 lektioner.
Insända lösningar rättas.

ATENTU!

12 malsimilaj bildkartoj pri Lund *kun esperanta teksto* kostas nur 1.50 sv. kr. Skribu hodiaŭ al *Evert Persson*, L:a Algatan 7, Lund. Sendu poŝtmarkojn!

In- och Utländsk Litteratur

Esperantoavdelning

Nya Aktiebolaget Biblioteksbookhandeln
Biblioteksgatan 12, Stockholm

N:ro 4 en la serio de Sveda Esperanto-Federacio estas aperinta:

Per kio ni amuzu nin?

Societ- kaj dancludoj.

De *Jakob Rosenberg* kaj *Ernfrid Malmgren*.

Enhavas kolekton de la plej amuzaj kaj belaj ludoj endomaj kaj liberaeraj, svedaj dancludoj kaj ĉenkantoj.

Prezo: Sv. kr. 1:— (por anoj de SEF 0,50).

La antaŭe aperintaj numeroj de la serio estas:

1. *Hur leder man fortsättningskurser i Esperanto?* De Einar Dahl.
2. *La Esperanto-Klubo. Kial fondi ĝin — Kiel organizi ĝin. — Kiaj estu la programoj?* De Ernfrid Malmgren. (En Esperanto.)
3. *»Lingva kvaronhoro».* De P. Nylén. (En sveda.)

NY LÄROBOK:

Snabbkurs i Esperanto

Av H. Seppik och Ernfrid Malmgren.

Särskilt avsedd för hotell-, restaurant-, bank- och trafikpersonal. Synnerligen enkel och trevlig. 10 lektioner.

Pris 60 öre.

TREDJE UPPLAGAN

av Frits Lindéns

Kurs i Esperanto

har nyss utkommit. Förf. har underkastat boken en grundlig omarbetning och den nya upplagan uppvisar, i jämförelse med den föregående, flera företräden.

Pris 90 öre.

Naciaj kostumoj Svedlandaj

Ĉar ni multfoje ricevis demandojn pri poŝtkartoj kun bildoj de niaj belaj naciaj kostumoj, ni faris elekton de la plej belaj kartoj tiaspecaj nuntempe haveblaj. Ili estas litografe presitaj en belaj koloroj. Adresflanko kun esperanta teksto.

Prezo: Serio da 10 diversaj kartoj sv. kr. 1:50; 1 karto 0:20.

Jo-Jo är glömt,

Lexicon

är namnet på den nyaste »flugan», som först uppstod i England och sedan dragit över flera länder som en stormvind. »Lexicon» är ett roande sällskapsspel. Det har nu utkommit i esperantoupplaga (det finns ännu icke på svenska!).

Pris pr spel kr. 3:—.

Eldona Societo Esperanto,

Poŝta fako 698, STOCKHOLM 1.

Poŝtĉeka konto: Stockholm 578.